

Fervoja Esperantisto



Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Numero 2

Aprilo - Junio 2024

Eŭropaj tagoj

Europäische Tage



Atingebla per aŭto, biciklo, tramo aŭ remboato:
la Eŭropa Parlamentejo
(vd. paĝon 3)

Mit Auto, Fahrrad, Tram oder Ruderboot erreichbar:
Das Europäische Parlament
(s. Seite 3)

Karaj gelegantoj	2	Liebe Leserinnen und Leser	2
Eŭropaj tagoj	3	Europäische Tage	3
Trovitaĵo donacebla	6	Fundstück zu verschenken	6
Detaloj pri Bad Elster	7	Einzelheiten zu Bad Elster	7
Aliĝilo jarkunveno 2024	8/9	Anmeldung Jahrestreffen 2024	8/9
Lisa Hartig 18.06.1930 – 27.01.2024	11	Lisa Hartig 18.06.1930 – 27.01.2024	11
GEFA-anoncoj, redakcio	12	GEFA-Mitteilungen, Redaktion	12



Karaj gelegantoj,

kvankam la unua ekskurso enkadre de la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo jam okazis fakte antaŭ la oficiala programo, kolektiĝis konsiderinda grupo antaŭ la enirejo de la eŭropa

parlamentejo, por inspekti kortojn, vestiblojn, halojn kaj ŝtuparejojn kaj rigardi de la balkono por vizitantoj en la asemblean salonon - sen deputitan en tiu momento tamen ne malplanan.

Inter la vicoj svarmis sonteknikistoj por varti kaj ripari la tradukan ekipaĵon – kapaŭdilojn, mikrofonojn, kablojn, kontaktilojn, plurŝtupajn ŝaltilojn. Kiu observas ilin kaj imagas la stabon de interpretistoj en siaj kabinetoj ĉirkaŭ la salono, tiu akiras impreson pri la enormaj klopodoj bezonataj por organizi debaton inter pli ol sepcent deputitoj kun plej diversaj gepatraj lingvoj. Kontribuoj ja povas esti prezentataj en unu el la dudek kvar oficialaj lingvoj. Por ke ĉiu ilin komprenu, la grupo de la interpretistoj devas regi kvincent kvindek du eblajn kombinojn. Ne ĉiu kombino estas disponebla senpere. Por kelkaj necesas la kromvojo tra relaksa lingvo, kio plie disdividas gestojn kaj parolon kaj kreskigas la probablon de miskomprenoj.

La kostoj de interpretado kaj tradukado jam nun konsumas trionon de la personara buĝeto kaj aldoniĝos pliaj ŝtatoj kaj lingvoj. Tial ĉiu konsentos, ke urĝas reformi la lingvo-reĝimon.

„Solvo de la problemo rapida kaj akceptata de ĉiuj partneroj, kiu unuflanke respektas la principon de samrajteco de ĉiuj lingvoj, aliflanke atentis la bezonojn de la buĝeto kaj la nebremsita funkcio de la EU-burokratio, el hodiaŭa perspektivo estas malfacile imagebla, nelaste pro tio, ĉar la lingvo-problemo por la plej multaj ŝtatoj havas tre politikan kaj emocian

Liebe Leserinnen und Leser,

obwohl der erste Ausflug im Rahmen des Europäischen Esperanto-Kongresses in Straßburg eigentlich vor dem offiziellen Programm stattfand, kam eine beachtliche Gruppe vor dem Eingang des europäischen Parlamentsgebäudes zusammen, um Höfe, Lobbies und Treppenhäuser zu inspizieren und vom Besucherbalkon in den großen Sitzungssaal zu schauen – in diesem Augenblick ohne Abgeordnete, aber nicht leer.

Zwischen den Reihen wimmelten Tontechniker, um die Übersetzungsausstattung zu warten und zu reparieren – Kopfhörer, Mikrofone, Kabel, Stecker, Wahlschalter. Wer sie beobachtet und sich den Stab von Dolmetschern in deren kleinen Kabinen um den Saal herum vorstellt, der erhält einen Eindruck von den enormen Aufwendungen, die erforderlich sind, um eine Debatte zwischen mehr als siebenhundert Abgeordneten mit den verschiedensten Muttersprachen zu organisieren. Beiträge können ja in einer der vierundzwanzig Amtssprachen vorgetragen werden. Damit jeder sie versteht, muss die Gruppe der Dolmetscher fünfhundertzweiundfünfzig mögliche Kombinationen beherrschen. Nicht jede Kombination ist unmittelbar verfügbar. Bei einigen muss der Umweg über eine Relaisprache eingefügt werden, was aber Gestik und Sprechen weiter voneinander entfernt und die Wahrscheinlichkeit von Missverständnissen wachsen lässt.

Die Kosten für Dolmetschen und Übersetzen, verbrauchen schon jetzt ein Drittel des Personalbudgets und es werden noch weitere Staaten und Sprachen hinzukommen. Daher wird jeder zustimmen, dass Zeit wird, das Sprachenregime zu reformieren.

„Eine schnelle und von allen Partnern akzeptierte Lösung des Problems, die einerseits den Grundsatz der Gleichberechtigung aller Sprachen achtet und andererseits den Erfordernissen des Haushalts sowie dem reibungslosen Funktionieren der EU-Bürokratie Rechnung trägt, ist aus heutiger Sicht nur schwer vor-

rangon“, skribis la scienca servo de la germana parlamento jam en Junio de la jaro 2000.

stellbar, nicht zuletzt deshalb, weil das Sprachenproblem für die meisten Staaten eine höchst politische und emotionale Bedeutung besitzt“, schrieb der Wissenschaftliche Dienst des Deutschen Bundestages schon im Juni des Jahres 2000.

Nu jes ...



Nun ja ...

Guido Brandenburg

Guido Brandenburg



Plena salono dum la kongresa malfermo / ein voller Saal bei der Kongress-Eröffnung

Eŭropaj tagoj

Eŭropa Esperanto-Kongreso de kvin eŭropaj kaj du tutmondaj Esperanto-asocioj dum Eŭropa Festivalo en la metropolo de Eŭropo: Oni povis anticipi, ke ĝi estos kompare granda aranĝo. Kun entute sescent aliĝintoj la skalo tamen surprizis ankaŭ la organizantojn. La eŭropa unueco kaj la unio kiel pacprojekto dominis ne nur la kongreson, sed la urbon Strasburgo entute.

Europäische Tage

Ein Europäischer Esperanto-Kongress von fünf europäischen und zwei weltweiten Esperanto-Verbänden während des Europa-Festivals in der Metropole Europas: Man konnte davon ausgehen, dass es eine relativ große Veranstaltung würde. Mit insgesamt sechshundert Angemeldeten hat das Ausmaß doch auch die Veranstalter überrascht.

Dum hejme krom sporade troveblaj afiŝoj preskaŭ nenio memorigas pri la baldaŭa baloto por la eŭropa parlamento, en Strasburgo ĝi influas la ritmon de la urbo. „Festo de Eŭropo“ dum preskaŭ unu monato vicigis enorman sortimenton de aranĝoj. Koncertoj, teatraĵoj, bistroĉaroj ilustris la kulturen diversecon. Infanoj kajeron kaj skribilon en la mano ludis paperĉasadon. Urbgvidantoj france, germane kaj alsace demonstris plurlingvecon. Publikaj diskutoj surtabligis temojn kiel koloniismon, sklavecon, militon. La festo demonstris, kiel la eŭropa ideo vivas kaj garantiis por la kongreso subtenon kaj publikan intereson.

La kongreslibreto enkonduke memorigas pri jam okazintaj komunaj aranĝoj de la franca kaj la germana asocioj, kiel en Kaiserslautern 2010 kaj Zweibrücken 2018 – kaj nelaste Strasburgo 1969, antaŭ kvindek kvin jaroj, en la sama konstruaĵo de la universitato, siatempe ankoraŭ pli elstara nur ses jarojn post subskribo de la kontrakto pri german-franca amikeco.



Tim Gallego kantas sendependan rokmuzikon,
Tim Gallego singt Indie-Rock

„Le Patio“ – la „teraso“ de la universitato disponas pri sufiĉe nombraj kaj grandaj salonoj por la bezonoj de la kongresprogramo, kiu kompreneble antaŭvidis kunvenojn en la pleno, laŭstatutajn kunsidojn de la organizaĵoj, prelegojn kaj atelierojn. Ĉarma ideo: La rapidmanĝaj ĉaroj antaŭ la pordo nutris la elĉerpitajn kongresanojn en la mallonga tagmeza paŭzo kaj evitis odiseadojn inter plenokupitaj restoracioj.

Die europäische Einheit und die Union als Friedensprojekt dominierte nicht nur den Kongress, sondern die Stadt Straßburg insgesamt.

Während zu Hause neben gelegentlich zu findenden Plakaten fast nichts an die baldige Wahl zum Europa-Parlament erinnert, wirkt sie sich in Straßburg auf den Rhythmus der Stadt aus. Ein „Fest Europas“ reihte über fast einen Monat ein enormes Sortiment von Veranstaltungen aneinander. Konzerte, Theaterstücke, Food-Trucks illustrierten die kulturelle Diversität. Kinder spielten mit Heft und Schreiber in der Hand Schnitzeljagd. Stadtführer demonstrierten französisch, deutsch und elsässisch Mehrsprachigkeit. Öffentliche Diskussionen brachten Themen wie Kolonialismus, Sklaverei, Krieg auf den Tisch. Das Fest demonstrierte, wie die europäische Idee lebt und garantierte für den Kongress Unterstützung und öffentliches Interesse.

Die Kongresbroschüre erinnert eingangs an schon vergangene Veranstaltungen des französischen und des deutschen Verbandes, wie in Kaiserslautern 2010 und Zweibrücken 2018 – und nicht zuletzt Straßburg 1969, vor fünfundsünfzig Jahren im selben Gebäude der Universität, seinerzeit noch herausragender nur sechs Jahre nach der Unterzeichnung des deutsch-französischen Freundschaftsvertrags. „Le Patio“ – die „Terrasse“ der Universität verfügt über Räume von ausreichender Zahl und Größe für die Bedürfnisse des Kongressprogramms, das selbstverständlich Zusammenkünfte im Plenum, Sitzungen nach Geschäftsordnung der Organisationen, Vorträge und Workshops vorsah. Eine nette Idee: Die Imbisswagen vor der Tür versorgten die erschöpften Teilnehmer in der kurzen Mittagspause und ersparten das Herumirren zwischen vollbesetzten Restaurants. Was etwas irritierte, waren die regelmäßigen (aber wahrscheinlich notwendigen) Taschenkontrollen beim Betreten des Hauses.

Das Abendprogramm mit Vorstellungen bekannter und weniger bekannter Musiker aus der grünen Szene verlegten die Veranstalter in

lom iritis la regulaj (tamen probable necesaj) dorsosakaj kontroloj enirante la domon. La vesperprogramon kun prezentoj de konataj kaj malpli konataj muzikistoj el la verda sceno la organizantoj lokis en la „maneĝo“, ŝanĝ-dediĉita ĉevalekzercejo (nun halo por distraj aranĝoj) en alia kvartalo kaj dividis la publikon pro mankanta spaco en du skipojn. Kiel surloka biciklanto mi persone estis tute kontenta, ke mi povis trapasi la vojon al mia loĝejo dum relative frua horo.



Vespero sur la Ponto de la du bordoj,
Abend auf der Passerelle des Deux Rives

Pri turismaj ekskursoj plejparte identaj kun tiuj de la IFK 2017 en Colmar ĉifoje mi decidis rezigni. Ĝenerale interesa tamen estis la vizito al la eŭropa parlamentejo kaj fakte interesa la invito de SNCF en riparar kaj bontenan centron proksiman al la ĉefstacio de Strasburgo. Bruno Henry organizis la ekskurson kaj brile tradukis la komplikajn klarigojn pri strategioj kaj tempoplanoj kaj parte malfacilajn demandojn pri teknikaj detaloj.

IFEF sin prezentis per la kutimaj aferoj kiel komitatkunsido, fakprelegoj, malferma diskuto pri movadaj aferoj. La estraro restas neŝanĝita. Rekandidatis kaj reelektiĝis la sekretarioj de la faka aplika (Jaroslav Matuška) kaj de la terminara sekcioj (Guido Brandenburg) en la faka komisiono. La estrara pozicio de gvidanto de la faka komisiono restas neokupita.

La inviton al la sekvontjara 76-a Internacia Fervoja Kongreso en slovakaj Žilina Magdaléna Feifíčová transdonis retbabile, sed pro tio ne

die „Manege“, eine umgewidmetes Pferdetrainingszentrum (jetzt eine Halle für Unterhaltungsveranstaltungen) in einem anderen Viertel und teilten das Publikum wegen fehlenden Platzes in zwei Schichten. Als lokaler Radfahrer war ich persönlich ganz zufrieden, dass ich den Weg zu meiner Wohnung zu relativ früher Stunde zurücklegen konnte.

Auf touristische Ausflüge, die zum Großteil mit denen vom IFK 2017 in Colmar identisch waren, hatte ich diesmal beschlossen zu verzichten. Von allgemeinem Interesse war aber der Besuch des Europäischen Parlamentsgebäudes und von fachlichem Interesse die Einladung der SNCF in ein Instandhaltungswerk nahe dem Hauptbahnhof Straßburg. Bruno Henry hatte den Ausflug organisiert und übersetzte brillant die komplizierten Erklärungen über Strategien und Zeitpläne und die zum Teil schwierigen Fragen über technische Details.



Lasta grupfoto post la vizito ĉe SNCF,
ein letztes Gruppenfoto nach dem Besuch
bei der SNCF

IFEF stellte sich mit den üblichen Sachen vor, wie Komitee-Sitzungen, Fachvorträgen, einer offenen Diskussion über Angelegenheiten der Bewegung. Der Vorstand bleibt unverändert. Nach erneuter Kandidatur wiedergewählt wurden die Sekretäre der Sektionen für fachliche Anwendung (Jaroslav Matuška) und Terminologie (Guido Brandenburg) in der Fachkommission. Der Vorstandsposten des Leiters der Fachkommission bleibt unbesetzt.

mapli kore. La invito estis danke akceptata. Pliaj informoj sekvos baldaŭ.



Die Einladung zum 76. Internationalen Eisenbahnerkongress im slowakischen Žilina überbrachte Magdaléna Feičíková per Internet-Chat, deshalb aber nicht weniger herzlich. Die Einladung wurde dankend angenommen. Weitere Informationen werden bald folgen.

Guido Brandenburg

(trad. Brandenburg)



Trovitaĵo donacebla

La fervojo en Germanio ne havas multajn motivojn por esti festata. Unu el ili estis la 150-jara jubileo en la jaro 1985, kiu referencis al la inaŭguro de la Ludovika Fervojo inter Nürnberg kaj Fürth.

Inter alie oni je tiu okazo havis specialan oferton por la numismatoj: monero kun nominala valoro de kvin germanaj markoj (kun la eŭro kiel kontanta mono ni nur interkonatiĝis 2002 ... vi memoras).

Tian specialan moneron trovis nia legantino Michaela ordigante la kelon de sia patrino kaj volas ĝin donaci al intereso.

Informu nin tutsimple per la redakcia adreso (vd. dorsflankon).

Ni peros la kontakton.

Fundstück zu verschenken

Die Eisenbahn in Deutschland hat nicht viele Anlässe gefeiert zu werden. Einer davon war das 150-jährige Jubiläum im Jahr 1985, das sich auf die Einweihung der Ludwigseisenbahn zwischen Nürnberg und Fürth bezieht.

Unter anderem hatte man bei dieser Gelegenheit ein besonderes Angebot für die Numismatiker: Eine Münze mit einem Nennwert von fünf Deutschen Mark (mit dem Euro als Bargeld hatten wir uns erst 2002 bekannt gemacht ... ihr erinnert euch).

Eine solche Sondermünze hat unsere Leserin Michaela beim Aufräumen des Kellers ihrer Mutter gefunden und möchten sie an einen Interessierten verschenken.

Informiert uns ganz einfach über die Redaktionsadresse (s. Rückseite).

Wir werden den Kontakt herstellen.

Guido Brandenburg

(trad. Brandenburg)



Hotelo Weiße Elster, stacio Františkovy Lázně, Albert teatrejo, Zamenhof-memorŝtono
 Hotel Weiße Elster, Bahnhof Františkovy Lázně, Albert Theater, T Františkovy Lázně, Zamenhof-Stein
 (Fotofotos: Bodo Ehrlich)

Detaloj pri Bad Elster

Kiel ni jam anoncis en la pasinta eldono, la GEFA-jarkunveno 2024 okazu en la sudoriento de Germanio, en Bad Elster en la Voktolando, proksime al la ĉeĥa landlimo. Kaŭzoj por tiu elekto estis pluraj. Krom la fakto, ke ne jam ĉiuj konas tiun regionon, tiun lokon kaj tiun domon, ĝi estu instigo al rendevuo kun niaj ĉeĥaj najbaroj. Kaj la domo havas subtegmentan naĝbasenon (ne forgesu vian bankostumon).

Aliajn argumentojn dokumentas la kuraĉloka muzeo: „Venu kaj fariĝu junaj, ankoraŭ pli belaj, sanaj, enamiĝintaj, entuziasmaj, gravedaj ...“ Nu do!

Einzelheiten zu Bad Elster

Wie wir schon in der letzten Ausgabe angekündigt hatten, soll das GEFA-Jahrestreffen 2024 im Südosten Deutschlands stattfinden, in Bad Elster im Vogtland nahe der tschechischen Landesgrenze. Für diese Auswahl gab es mehrere Gründe. Neben der Tatsache, dass noch nicht alle die Gegend, den Ort, das Haus kennen, soll sie eine Anregung für ein Rendezvous mit unseren tschechischen Nachbarn sein. Und das Haus hat ein Schwimmbecken unter Dach (vergesst nicht eure Badebekleidung).

Andere Argumente dokumentiert das Bädermuseum: „Kommt und werdet jung, noch schöner, gesund, verliebt, begeistert, schwanger ...“ Na also!

Limdato
Anmeldeschluss:
08.09.2024

Aliĝilo / Anmeldebogen
GEFA-jarkunveno Bad Elster
08.-11.11.2024

Antaŭnomo, familia nomo / Vorname, Name		
Strato, numero / Straße, Nr.		
Poŝtkodo, loko / PLZ, Ort		
Lando / Land		
Transporto dezirata 08.11.2024 de stacio Bad Elster alvenhoro:	Transporto dezirata 08.11.2024 de stacio Hof alvenhoro:	irmalhelpita / gehbehindert jes/ne

Dua persono en dulita ĉambro / zweite Person im Zweibettzimmer		
Antaŭnomo, familia nomo / Vorname, Name		
Strato, numero / Straße, Nr.		
Poŝtkodo, loko / PLZ, Ort		
Lando / Land		
Transporto dezirata 08.11.2024 de stacio Bad Elster alvenhoro:	Transporto dezirata 08.11.2024 de stacio Hof alvenhoro:	irmalhelpita / gehbehindert jes/ne

Unua persono / erste Person	BSW-subtenanto (edzo) / eksterl gasto BSW-Förderer (Ehegatte) / ausl. Gast
Lito en unulita ĉambro (inkl. DP)	(231,60 €)
Bett im Einbettzimmer (incl. HP)	
Lito en dulita ĉambro (inkl. DP)	(162,60 €)
Bett im Zweibettzimmer (incl. HP)	
Dua persono / zweite Person	BSW-subtenanto (edzo)/ BSW-Förderer (Ehegatte)
Lito en dulita ĉambro (inkl. DP)	(162,60 €)
Bett im Zweibettzimmer (incl. HP)	
Sumo	
Summe	

La tranokta prezo validas por tri noktoj.
Ĝi inkludas matenmanĝon, vesperan
bufedon kaj la kuraclokan kotizon.

Aldoniĝas partoprenkotizo de 20,- € por kovri
programkostojn.

Kotizon kaj tranoktan prezon mi pagos
surloke en la hotelo.

Der Übernachtungspreis gilt für drei Nächte.
Er enthält Frühstück, Abendbuffet und die
örtliche Kurabgabe.

Hinzu kommt ein Teilnahmebeitrag von 20,- €
zur Deckung von Programmkosten.

Beitrag und Übernachtungspreis werde ich
vorort im Hotel begleichen.

daŭrigo de paĝo 7**Fortsetzung von Seite 7**Atentinde estas:

Alvojaĝa tago estos vendredo, la 8-a de Novembro, la forira lundo, la 11-a de Novembro.

La adreso de la domo estas: **Hotel Weiße Elster, Endersstraße 3, DE-08645 Bad Elster.**

La fervoja stacio Bad Elster situas en distanco de ĉ. 4 km. Utilas interkonsenti transport-servon.

Trajnvojaĝantoj pripensu elekti pli facile ating-eblan celstacion Hof. De tie estas organizebla gruptakson, kiu por la 37 km ĝis la hotelo bezonus ĉ. unu horon. Bonvolu indiki tion sur la aliĝilo.

Se la vetero tion permesas, ni volas sabaton ekskursi per Vogtlandbahn trans la limon al Františkovy Lázně (Franzensbad), bohemia banloko kun pitoreska urbocentro (inkluzive zamenhofan memorŝtonon) kaj dimanĉon promeni tra Bad Elster kun vizito al la Albert-teatrejo.

Por kovri programkostojn ni petas pri kotizo de 20,- €. Eksterlandaj partoprenantoj estas liberigitaj.

Kiel aliĝi?

- a) Sendu la informojn el la aliĝilo sur paĝoj 8/9 per retmesaĝo al la redakcia adreso **fervoja.esperantisto@t-online.de** aŭ
- b) sendu skankopion de la aliĝilo sur paĝoj 8/9 per aldone al retmesaĝo al la redakcia adreso **fervoja.esperantisto@t-online.de** aŭ
- c) sendu kopion de la aliĝilo sur paĝoj 8/9 al la poŝta adreso.

**BSW-Ortsstelle Werk Kassel
Freizeitgruppe Esperanto
Frasenweg 20-36
DE-34128 Kassel.**

Grave:

Ĉiuj pagoj nur surloke en Bad Elster
Senkosta nuligo de aliĝoj eblas nur ĝis la 20-a de Septembro.

Zu beachten ist:

Anreisetag ist Freitag, der 8. November, Abreisetag Montag der 11. November.

Die Adresse des Hauses ist: **Hotel Weiße Elster, Endersstraße 3, DE-08645 Bad Elster.**

Der Bahnhof Bad Elster ist etwas 4 km entfernt. Es ist nützlich, einen Transportdienst zu vereinbaren.

Zugreisende sollten überlegen, den leichter erreichbaren Zielbahnhof Hof zu wählen. Von dort aus kann ein Sammeltaxi organisiert werden, das für die 37 km zum Hotel etwa eine Stunde brauchen würde. Vermerkt das bitte auf der Anmeldung.

Wenn es das Wetter erlaubt, wollen wir Samstag einen Ausflug mit der Vogtlandbahn über die Grenze nach Františkovy Lázně (Franzensbad) machen, einem böhmischen Badeort mit einem schmucken Stadtzentrum (einschl. Gedenkstein für Zamenhof) und am Sonntag einen Spaziergang durch Bad Elster mit Besuch des Albert-Theaters.

Zur Deckung von Programmkosten bitten wir um einen Beitrag von 20,- €. Ausländische Teilnehmer sind freigestellt.

Wie anmelden?

- a) Sendet die Informationen aus dem Anmeldeformular auf den Seiten 8/9 per Email an die Redaktionsadresse **fervoja.esperantisto@t-online.de** oder
- b) sendet eine Skankopie des Anmeldeformulars auf den Seiten 8/9 als Email-Anhang an die Redaktionsadresse **fervoja.esperantisto@t-online.de** oder
- c) sendet eine Kopie des Anmeldeformulars auf den Seiten 8/9 an die Postadresse **BSW-Ortsstelle Werk Kassel, Freizeitgruppe Esperanto, Frasenweg 20-36, DE-34128 Kassel.**

Wichtig:

Alle Zahlungen nur am Ort in Bad Elster
Kostenfreier Rücktritt ist nur bis zum 20. September möglich.

Lisa Hartig 18.06.1930 – 27.01.2024



Danke al Lisa, al Dieter kaj al ilia filo Klaus-Dieter konserviĝis la travivaĵoj kaj anekdotoj, la historio de „tute normala familio“ - historio kutime nur rakonte transdonita de generacio al generacio, paliĝanta ĝis malapero, ne grava sufiĉe por enciklopedioj kaj arkivoj.

Danke al ili do ni povas imagi la vivon de Lisa sen la frue mortinta patro en la antaŭmilita Findorff, la ripetajn ŝanĝojn de lernejo al lernejo por eskapi la minacantajn bombojn, la alvenon kvazaŭ rifuĝinto en fora heslanda vilaĝo, la timon pri la patrino restinta en la atakata grandurbo Bremen kaj la revenon al la ruinoj.

Kiam ŝi renkontis Dieter ses jarojn poste, Lisa estis 20-jara. Ŝi laboris en magazeno, li jam estis fervojisto kaj alstrebis okupon en la vetura servo. Du jarojn post la geedziĝo Lisa kaj Dieter unuafoje fariĝis gepatroj, Lisa finis laboron en la magazeno kaj Dieter devis dediĉi sian tempon al la profesio. 1957 naskiĝis dua infano. La vivo similis al tiu de multaj familioj: Mem semi kaj rikolti, mem triki kaj tajlori, dufoje turni ĉiun moneron antaŭ elspezi ĝin.

Dank Lisa, Dieter und ihrem Sohn Klaus-Dieter sind die Erlebnisse und Anekdoten erhalten, die Geschichte einer „ganz normalen Familie“ – einer Geschichte, die gewöhnlich nur durch Erzählen von Generation zu Generation weitergegeben wird und verblasst bis zum Verschwinden, nicht wichtig genug für Enzyklopädien und Archive.

Dank ihnen also können wir uns das Leben von Lisa vorstellen ohne den früh gestorbenen Vater im Vorkriegs-Findorff, die wiederkehrenden Schulwechsel, um den drohenden Bomben zu entgehen, das Ankommen wie ein Flüchtling im fernen hessischen Dorf, die Angst um die Mutter, die im angegriffenen Bremen geblieben war und die Rückkehr in die Ruinen. Als sie Dieter sechs Jahre später begegnete, war Lisa 20. Sie arbeitete in einem Kaufhaus, er war schon Eisenbahner und strebte eine Beschäftigung im Fahrdienst an. Zwei Jahre nach der Heirat wurden Lisa und Dieter das erste Mal Eltern. Lisa beendete ihre Arbeit im Kaufhaus und Dieter musste seine Zeit dem Beruf widmen. 1957 wurde ein zweites Kind geboren. Das Leben ähnelte dem vieler anderer Familien: Selbst säen und ernten, selbst stricken und schneidern, jede Münze vor dem Ausgeben zweimal umdrehen.

Es folgten ruhigere Zeiten mit Raum für andere Interessen und der Kontakt von Dieter mit der internationalen Sprache Esperanto. Er lernte sie und übte in Kursen und Seminaren. Ob er Lisa darin unterrichtet oder ob sie sie sich auf andere Weise angeeignet hat, das verrät die Familienchronik nicht. Sie berichtet von gemeinsamen Kongressen in Eisenbahner-Umgebung, Begegnungen mit ausländischen Freunden und Besuchen reisender Esperantisten, Ämtern in Esperanto-Verbänden, Terminologie-Arbeit. Lisa begleitete im Hintergrund, organisierte, versorgte - ein ruhender Pol der Familie.

Nach Dieters Zurruehesetzung im Jahr 1985 verfügte das Paar über mehr Zeit für gemeinsame Unternehmungen, insbesondere mehr

Sekvis pli trankvilaj tempoj kun spaco por aliaj interesoj kaj la kontakto de Dieter kun la internacia lingvo Esperanto. Li ĝin lernis kaj ekzercis sin en kursoj kaj seminarioj. Ĉu li instruis ĝin al Lisa, aŭ ĉu ŝi alimaniere akiris la lingvon, tion la familia kroniko ne malkaŝas. Ĝi raportas pri komunaj kongresoj en fervojista medio, renkontiĝoj kun eksterlandaj geamikoj, vizitoj de vojaĝantaj esperantistoj, oficoj de Dieter en Esperanto-asocioj, terminara laboro. Lisa fone akompanis, organizis, prizorgis - trankvila poluso de la familio.

Post emeritiĝo de Dieter en la jaro 1985 la paro disponis pri pli la tempo por komunaj entreprenoj, specife pli da vojaĝoj tra tuta Eŭropo. Bremsi ilin povis nur la malagrablaj flankoj de la aĝo.

Dieter forpasis en Novembro 2014. Du jarojn poste Lisa reduktis siajn posedaĵojn kaj ekloĝis en maljunulejo, de kie tamen ŝi atente observis la esperantistan vivon.

Nun Lisa postsekvis Dieter 94-jara.

Reisen durch ganz Europa. Nur die unangenehmen Seiten des Alters konnten sie bremsen.

Dieter starb im November 2014. Zwei Jahre später zog Lisa in ein Seniorenheim, von wo sie aber das Esperanto-Leben aufmerksam beobachtete.

Nun ist Lisa Dieter im Alter von 94 Jahren gefolgt.



Guido Brandenburg

(trad. Brandenburg)

Redaktofino por FE 03/2024 estos la 15.08.2024	Redaktionschluss für FE 03/2024 ist der 15.08.2024
Eldono: Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.	Herausgabe: Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio: Guido Brandenburg	Redaktion: Guido Brandenburg
Adreso: Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt	Adresse: Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono: 02508-9107	Telefon: 02508-9107
Fakso: 02508-984511	Fax: 02508-984511
Retpoŝto: fervoja.esperantisto@t-online.de	Email: fervoja.esperantisto@t-online.de
Kotizkonto:	Beitragskonto:
Nomo BSW Esperanto Essen	Name BSW Esperanto Essen
IBAN: DE44 3606 0591 0000 5045 63	IBAN: DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC: GENODED1SPE	BIC: GENODED1SPE
Donacoj estas bonvenaj sur konto:	Spenden sind willkommen auf dem Konto:
Nomo Andreas Diemel GEFA	Name Andreas Diemel GEFA
IBAN: DE16 5009 0500 0000 9537 29	IBAN: DE16 5009 0500 0000 9537 29
BIC: GENODEF1S12	BIC: GENODEF1S12